



Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

J A R A B O N O

MAJO - JUNIO - JULIO - AŬGUSTO

Jarabono : 60 fkoj

P. BABIN

13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes

P.C.K. Nantes : 2.813.61

1983 - 3 - 4

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

El Grésillon

MIA AMAS LA VOJAGOJN, SED... (PRI VERA OKAZAJO)

« Kien mi metis ĝin ? Kie ĝi sin kaŝas ? » Mi ofte aŭdas tiujn demandojn dum mi simple duondormas en la fundo de iu ŝranko, en la mallumo. Ne komforta loko, vi diras. Jes. Sed por mi, kvankam mi sentas grandan malplenon, la ekstera mallumo divigas min trovi lumon internan, malantaŭ miaj palpebroj. Mi denove vojaĝas al agrablaj lokoj sunplenaj, kie la homoj ne surmetas ŝuojn kie, supre, palmoj flirtas, kie la plankoj estas freŝaj kaj komfortaj. Mi amas tiujn vojaĝojn ankaŭ ĉar ili ebligas rektajn kontaktojn kun mia mastrino. Ŝi tenas min per sia mano. Ŝi kuŝigas min apud ŝi en la aŭtomobilo. Mia pli malpli longa restado en la malluma ŝranko kreas por mi la etoson favoran al elvoko de la plej agrablaj momentoj de mia vojaĝanto-vivo. Kaj kiam mi aŭdas la « kien mi metis ĝin ? » mi scias, ke denove baldaŭ malaperos tiu sento de malpleneco. Pezigos min la trezoroj de mia mastrino. Finfine kaj precipe forflugos tiu malagrabla ideo, ke mi ne plu utilas. La momenta duonangoro de mia mastrino montras, ke ankaŭ mi rolas gravan rolon. Fakte ŝi ne povas vojaĝi sen mi. Eble ŝi konsideras min kvazaŭ amikon. Ĉu fidebla amiko ? Mi timas, ke de tempo al tempo mi ellasas parton el la trezoroj, kiujn mia mastrino konfidis al mi. Ve, ankaŭ valizoj maljuniĝas !

Mi ĉiam fidis mian mastrinon, kiel ŝi ŝajne fidas min. Dum nia vaganta vivo mi ĉiam estis trankvila, kiam mi estis ĉe ŝi, apud ŝi, kontraŭ ŝi kaj ankoraŭ pli kiam mi estis ĉe ŝia mano. Ŝi neniam grumbliis kontraŭ mi, kiam mi ne sukcesis sufiĉe ŝveli por ricevi ĉiujn ŝiajn trezorojn. Ŝi neniam ofendis min, ĝis...

Antaŭ ne tre longe mi estis eltirita el mia malluma loĝejo, rapide ŝtopita per diversaj aĵoj, metita en la kofron de la aŭtomobilo kaj ek al... mi ne sciis kien, sed mi iom divenis ĉar baldaŭ knabinoj eniris la aŭton kaj mi akceptis tri kunvojaĝantojn en la kofro. Mi komprenis, ke denove ni iros al tiu impona konstruaĵo, kie kunvenas infanoj tre diversaj : blondharaj, brunharaj, ruĝharaj, blankhaŭtaj, nigrahaŭtaj, flavhaŭtaj eĉ kun fendoformaj okuloj. Mi ne komprenas, kion ili diras. Ili parolas iun lingvon fremdan almenaŭ al mi, kiun ili nomas... Esperanto. Mi kredas, ĉar mi neniam aŭdis pri Esperanto-kursoj por valizoj. Kiel kutime mi staris kvin tagojn en ĉambreto. De tie mi aŭdis, ĝojajn kriojn, kantojn kaj babiladojn. Iun matenon fruaj rapidaj paŝoj kaj konversacioj vekis min. Mia mastrino denove plenisĝis min kaj prenis min malsupren, kie ŝi lokis min en angulo. Multaj kolegoj miaj amasiĝis en la granda vestiblo. Iu apogis pezan dorsosakon sur min. Aŭtomobiloj alvenis ĝis la perono. Dufoje mia mastrino preterpasas min : « Kolektu viajn pakaĵojn por ne forgesi ilin ! » Juna voĉo krias : « Mi metas viajn pakaĵojn en la kofron, Eric ». « Jes, dankon ». La dorsosako moviĝas... kaj ankaŭ mi. Iu mano portas min al aŭtokofro. Mi timas ĉar mi ne konas la lokon. Sed eĉ se mi kapablus kriu mi ne povus ĉar mi estas premata de la dorsosako, kiu volas trovi propran lokon. Motoro ekfunkciigas. Mi forvojaĝas kaj mia mastrino restas. Ŝi certe ne scias, ĉar ŝi protestus. Post tempo, por mi longa, la aŭto haltas, la kofro malfermiĝas. « Mi elprenas viajn pakaĵojn, Eric ». Mi sentas min elprenata samtempe kiel la dorsosako, kiun oni denove apogas sur min. « Restas al vi nur kvin minutojn antaŭ la foriro de via vagonaro », diras vira voĉo. « Ĝis revido ! ». « Ĝis revido ! ». « Ĝis ! » respondas junulo, kiu mansvingas al la kondukanto kaj knabo, kiuj tuj ekiras. Rapide la junulo prenas sian sakon, rigardas min surprize kaj ĉirkaŭe al eventuala posedanto. Sed la vagonaro ne atendas !

Mi denove ektimas. Kion mi faras sur tiu trotuaro ? Kio nun okazos ? Mi aŭdas la vagonaron ekiri. Mi nun devas atendi. Kion ? Kiun ? Mi eĉ ne povas dormi ĉar estas ege malvarme... Ŝajnas tamen, ke mi dormetis ĉar paroloj vekas min : « Ho, Jako, kiu estas tiu valizo ? Ĝi estis jam tie antaŭ duonhoro ». « Alportu ĝin internen en la oficejon ». La du viroj rigardis min, turnas min, priserĉas min, parolante pri « bombo ». Kial ? Mi ne scias. Sed ne gravas ĉar ĉi tie estas varme. La du priserĉintoj malordigis ĉion. Kion pensos mia mastrino, kiam ŝi retrovos min ? Ĉar mi nun estas certa, ke ŝi retrovos min ĉar la viroj parolas pri posedanto. Jus metite sur breto mi endormiĝas. Mi sonĝas, ke mi estas gardata en turo, ke amikoj serĉas min sed ne trovas la vojojn al mi kvankam mi aŭdas ilin. « Kio okazis ? ». La vortoj vekas min sed mi ne konas la personojn kiuj diris ilin. Mi tamen estas certa, ke dank'al ili mi baldaŭ estos ĉe la mano de mia mastrino. Kaj fakte, post du-taga vojaĝo per vagonaro (nova travivaĵo) mia mastrino ameme prenas min, kvazaŭ ŝi volus ricevi pardonon pri malbona ago, aŭ tute simple ĉar ŝi ĝojas retrovi ŝiajn trezorojn.

Ne plu lasu min mastrino ! Mi ekzerciĝos por fariĝi pli ŝvelopova... kvankam miaj muskoloj kaj artikoloj rememorigas al mi mian agon. Tamen' ne forjetu min. Mi deziras plu vojaĝi. Ĉu mastrino ?

Esperanto tra la Mondo



ESPERANTOLOGIA KONFERENCO EN BUDAPEŝTO

En la kadro de la venonta universala kongreso en Budapeŝto okazos la 6a Esperantologia Konferenco. La ĝenerala temo estos : « Faklekso en esperanto ». Ĉin prizorgos la fako « Esperanto, lingvo kaj literaturo » de la katedro pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko, en la Sciencuniversitato Eötvös Loránd, gvidata de profesoro D-ro István Szerdahelyi.

La gvidanto de la konferenco estos D-ro Wacha Balázs kaj oni klopodos vekti intereson ĉe neesperantistaj lingvistoj.

Esperanto-Universitato kun Pedagogia Seminario

De la 24a ĝis la 30a de julio, en la kadro de la 21a Somera Esperanto-Kongreso en Gyula (Hungario), okazos Pedagogia Seminario de U.E.A., kun interŝanĝo de spertoj pri la metodoj de esperanto-instruado.

Pri la programo respondacas S-ro Zs. Barcsay (L.K.K. de la 68a Universala Kongreso, Pf. 193, H-1368 Budapeŝto).

Dum la kongreso mem, estas antaŭvidata « Ĝago de la Lernejo ».

Ni aldonu ke S-ro Barcsay estas la oficiala hungara inspektoro por la lerneja instruado de esperanto por la tuta lando.

Kongreso de Kibernetiko

De la 23a ĝis la 28a de aŭgusto okazos en Namur (Belgio), la internacia kongreso de kibernetiko kun tri laborinovi : franca angla kaj esperanto. Inf. S-ro H. Frank, Kleinbergerweg 16 B, D-4790 Paderborn, F.G.R.

Premio por medicina publikigado en esperanto

Universala Medicina Esperanto-Asocio (U.M.E.A.) aliaŭas ĉiujare premion por la plej elstara medicina esploralaboro publikigita en esperanto. La kaniŝito por la premio konsistas nun el ĉirkaŭ 100.000 guldonoj.

Nova universitata diplomiĝo per interlingvistika temo

En la fakultato de Filozofio kaj Literaturo de la Universitato en Liège (Belgio), antaŭ nelonge diplomiĝis Fino Huquette Tholet. La temo estis : « Evoluproblemoj de la artefariaj lingvoj ; esperanto ».

Kvin novaj akademianoj

Akademio de esperanto havas kvin novajn membrojn. Ili estas Probal Daŝguto (vic-profesoro pri sanskritaj lingvoj en Puneo, Hinda Unio), Bernard Golden (arkeologo en Veszprém, Hungario), Li Shihun (tradukisto en Pekino, Ĉinio), Bruce Arne Sherwood (vicdirektoro de esplorlaboratorio pri komputila instruado en Urbana, Usono) kaj Humfrey Tonkin (profesoro pri angla literaturo en Filadelfio, Usono).

Entute, estas nun 46 akademianoj.

Universitata grupo en Ebra Bordo bezonas lernilojn

Esperanto-kurso estis malfermita en la universitato de Abidjan sed la gvidanto de tiu kurso bonvenigis lernilojn, precipe francinajn kaj internaciajn. Adreso : S-ro Gilles Waliez, 06-B.P. 477, Abidjan 06, Côte d'Ivoire.

Novaj libroj...

— « Internacia kemio-vortaro esperanta-angla-germana », de Manfred Westermayer, 71 paĝoj, kompletigita de la korespondaj vortaroj angla-esperanta-germana kaj germana-esperanta-angla (por fakuloj).

— « Esperanto in the modern world/Esperanto en la moderna mondo ». Informa dulingva libro por la anglalingvaj landoj.

— « Cina-esperanta vortaro ». 14.000 vortoj, 384 paĝoj (poŝformato).

— « Saluton ! Esperanto aŭtodidakte ». Rektmetoda lernlibro (povas ankaŭ taŭgi por kursoj), de Audrey Childs-Mee.

— « La Programlingvo Pascal », de Christian Martin, 72 p., mimeo. Prezento de tiu komputila programlingvo kun kelkaj ekzemplaj programoj.

— « Siberio en neĝo », de la japana kontraŭmilitisma verkisto Denzi Kurosima. Tradukis M. Miyamoto (tri rakontoj).

— « Unu aŭ nul », de Guy Marchand. Tradukita de la franca. Prezento de la mondĉivitanaj konceptoj.

— « La Virineto en bluo kaj aliaj rakontoj » de Mason Stuttard. Represo de dek-tri rakontoj originale verkita en esperanto.

...kaj disko kaj kasedo

— « Du bulgaroj kantas en esperanto ». Gramofondisko. Kantas Maria Angelova kaj Dimitro Denčev. Dek-sep famaj arioj kaj kantoj kaj du belaj voĉoj de operkantistoj.

— « Frandu piron ». Kasedo 34-minuta, kun tekstoloĝo. Valeno interpretas 13 kantojn el diversaj landoj kaj kelkajn originalaĵojn. Instrumenta akompano de Gianfranco Molle.

Turismo en Jugoslavio

« Polet Tunist », en Jugoslavio, aranĝos 30 sinsekvajn semajnajn aŭtobusajn rondvojaĝojn ĝis la 29a de oktobro kaj, inter la 13a de junio ĝis la 3a de oktobro, ok semajnajn esperanto-kampaĵojn ĉe la adriatika marbordo (Omiš kaj Mali Rat).

Informas Zelimir Pehar, Opatijska 41, YU-54000 Osijek, Jugoslavio.

Ripoztendaro por komputistoj

Esperanto-komputistoj de Hungara Esperanto-Asocio (Pf. 193, H-1368 Budapeŝto), organizos alian marbordan ripoztendaron (FAKO 83), en Ahtopol (Bulgario), de la 8a ĝis la 20a de aŭgusto.

Konstantaj progresoj en Ĉinio

La tre interesa esperantlingva revuo « El Popola Ĉinio » daŭre raportas pri la impeta antaŭeniro de la ĉina esperanto-movado. Daŭre, novaj grupoj estas fonditaj kaj kursoj malfermitaj, ĝenerale kun multegaj glerantoj.

Oni tiel anoncas ke la koresponda lernejo de la urbo Huainan havas kursojn elementan, mezgradan kaj sonlernigan kaj ke en pli ol unu jaro, ĉirkaŭ 20.000 lernantoj diplomiĝis. Dume, la koresponda kurso de la Huangshi-a Asocio, ricevis aliĝon de lernantoj el pli ol 20 provincoj kaj municipoj.

La plej grandaj ĵurnaloj sufiĉe ofte raportas pri la movado kaj oni eldonis lasttempe « ĉinan-esperantan vortaron ».

IRAN - ESPERANTO RAPORTAS

FAKA ESPERANTO, KAJ FACILA ESPERANTO

La manko de la organizitaj E-o asocioj en la tria mondo estas ja de longe amara fakto konata. Eble, tio estas unu el la plej gravaj kaŭzoj de la postresteco de tria-mondaj landoj Esperantistate. La okcidentaj movadoj, inkluzive gazetaro, ofte, kaj sincere deziradas disvolvon de E-o en tiaj landoj. Sed, ilia foresto de la lokaj cirkonstancoj, kaj nesufiĉaj informoj pri tieaj kondiĉoj, ŝajne ne permesas al ili agi tute efike tiutere.

Iranaj gee-istoj, i.a., por kontentigi tiun bezonon certagrade, fondis Iran-Esperanto-n (I.E.), antaŭ ĉ. 2 jaroj (esperanto, dec. 1981, p. 209). Malgraŭ grandaj malfacilaĵoj, kaŭze de revolucio kaj milito, ĝisdatite oni povis, ne ĉiam malsukcese, administri la 3-etagan konstruaĵon luitan. Por pli regule trakti la aferojn, oni organizis diversajn Labor-Grupojn (L.G.). Tamen menciinde estas, ke ĉe Irananoj, organizado ne havas tian striktan sencon, kian ĉe okcidentanoj. Por esti fruktodona, organizado ĉi tie, devus esti iom pli familia.

IE-anoj, rigardas, kiel iu ĉefa movada devo, informi diligentan kolegaron de aliaj landoj, pri siaj vidpunktoj, bezonoj, ktp. Tial, ili decidis dissendi raport-forme siajn laŭkondiĉajn reagojn, proponojn, spertojn, postulojn, kaj eventualajn atingiajn eksterlandan. Tiaj raportoj, kompreneble, ne esprimas personajn vidpunktojn, sed, resumojn de jam diskutitaj kolektivaj opinioj de la IE-anoj, inter kiuj troveblas 13jara knabino ĝis 75jara avo!

Komuna kunsido de la LG-oj okazas ĝenerale ĉiu-du-semajne. Dum la kunvenoj krom diskutado pri la kurantaj aferoj, oni pritraktas ankaŭ E-an gazetaron.

Lastatempe okazis raportenda diskuto, kies kaŭzo estis simpla Satiro de l'Monato (11/82, p. 9) — sendube unu el la plej karaj trezoroj de nia movado. Ĝi ŝajngas ian miskomprenon, se ne antagonismon, inter la eksto de Facila E-o kaj Faka E-o. La verkinto, sub la titolo « Nun la venko estas certa 'per piĝin-E-o' », aludas al nova decido pri facila parto en Kontakto. Tio, laŭ li, pravas, ke por popularigi E-on en la tria mondo, jam oni ne bezonas fakan terminaron kaj scienc-teknikajn librojn en E-o. Sufiĉas nur ia piĝin-E-o por certigi la venkon ĉe la « evoluĥomoj » en la « evolulandoj ».

Konsciante, ke ja en neniu ŝerco tute mankas la vero, IE-anoj trovis la temon grava, kaj eĉ vivegrava por la estonteco de E-o en la Tria mondo. Konstatoj de la diskutoj jenaj :

(1) — Kiel antaŭe deklariĝe, la forta bezono pri scienc-teknikaj verkoj ĉe la tria-mondanoj, igas ilin unuavice serĉi kaj lerni la plej facilan

lingvon (esperanto, dec. 1977, p. 202-207 kaj jan. 1978, p. 4-8). Tion konfirmas ankaŭ multaj gravaj reagoj tiutere i.a. fondigo de Scienc-eldona Centro en Budapeŝto (esperanto, maj. 1981, p. 81) seriozaj aktivoj de diversaj grupoj kaj sindikataj individuoj por riĉigi sciencan literaturon de E-o. Tiaj agadoj senbruiĝas, ŝajne ja meritas okupi apartan raporton. Sed, ĉi tie, estas menciinda la apero de la tiucela raporto en Monato mem, pri la eldono de kemia lerno-libro en E-o (Monato, 1/82, p. 26). E-an eldonon de la lerno-libro, dediĉos profesoro Linus Pauling — dufoje Nobel-premiita scienculo kaj pacbatalanto — al la studentoj de la tria mondo. Estus inde, se Monato kune presus biografieton de tiu granda homo por estime danki lin. Aliflanke, al E-istaro estus kuraĝiga scii kiaj kolosoj estas por nia movado.

(2) — Efektive, la plejmulto de la E-a vortradikaro, konsistas el tiu fremdaj lingvoj al orientanoj. Ĉi-prie, samideano Pandiŝo en El Popola Ĉinio (10/82, p. 14), diras :

« Por ni ĉinoj, lerni E-on estas multe pli malfacile ol por okcidentanoj. Oni diras ke la malfacileco de fremdlingva lernado por la ĉinoj kuŝas en tio, ke plejparto de la lernitaj fremdaj vortoj baldaŭ forgesigas kaj fariĝas denove fremda al la lerninto ».

Dum la slav- kaj latinid-lingvanoj, respektive, trovas jam, unuavide, ĉe si, konataj 60 % ĝis 80 % da E-aj radikoj, tiu procento ĉe alilingvanoj, precipe azianoj, proksimiĝas al kvazaŭ nulo. Do, E-o, kun ĉia sia facileco, ne estas tiel facile ellernebla por orientanoj kaj afrikanoj, kiel por okcidentanoj. Konsekvence, ankaŭ instru-metodo, rilate la kvanton da vort-provizio, devas diferencii ĉe latiniduloj ol alilingvuloj. Ankaŭ la gazetaro ne povus estis escepto tiurilate. Almenaŭ por la komencantoj en la tria mondo necesas ekzisti facilaj lingvaj revuoj.

Jam ankaŭ en Esperantujo oni atingis tion, ke por la diversaj homgrupoj devus ekzisti diversgradaj lingvo-niveeloj. Kial, ni ne utiligas la spertojn de 300 jara didaktik-historio de aliaj lingvoj, kiel Angla, por popularigi nian lingvon ? Ĉu oni ne altrudis onies malfacilajn lingvojn ĉi-maniere ?

De longe en ĉiuj, literature altnivelaj, lingvoj ekzistas lingve diversgradaj libroj, kaj revuoj. Nu, nun, dum la revuo « Esperanto » prezentas tipan E-on iom oficialan, « Kontakto » prezentas tion por la junularo. Hodiaŭan kaj praktikajn lingvajon liveras « Monato ». Ties materialo taŭgas por la postkomencaj kursoj, kaj oni jam utiligas ĝin tiucele en IE. Ĝi, dekomence, havis ankaŭ por-infanan paĝon, kiu sendube uzas pli

simplan E-on, kaj ni ege esperas, ke Monato, Semajniĝo. El Popola Ĉinio, dispanante tre simplan prozon, multe elegantas. Ekzistas ankaŭ aliaj periodaĵoj, kiuj havas pli aŭ malpli, facilan lingvon.

Tamen, ĝis nun, precipe en la kursoj okazantaj en la tria-mondaj landoj, ege sentiĝis la manko de iu facila magazino speciala por komencantoj, en kiu estus tre limigita vort-provizo. Ĉar plej ofte, oni post la fino de la elementa kurso ne trovas sin kapabla ĝui eĉ unu el ili. Tiel, multaj forlasis E-on pensante, ke ankaŭ E-o estas malfacila, kaj oni trompis ilin. Tion kaŭzas ankaŭ aliaj faktoroj :

(a) — Ofte, manko de adekvataj nacilingvaj vortaroj.

(b) — Literografio de E-o per latinaj literoj. Irananoj ne skribante sian nacian lingvon per latina aboco, eĉ post ellerno de E-o, legas ordinar la E-ajn tekstojn 5 ĝis 10 paĝojn malpli rapide, pohore, ol la nacilingvaj skribaĵoj. Tion aludas ankaŭ s-ino Nagata Akiko en sia interesa artikolo orienteska :

« Nun pli ol duono de la homaro sur la terglobo kutimas skribi ne-latinlitero. Kaj ĉiu kvina homo el la tuta homaro kutimas skribi ĉinajn idografiaĵojn (inkluzive en Japanio kaj Korea Respubliko). E-o komencis pentri ankaŭ tiajn mondopartojn kaj ne plu estas monopolajo de la latinliteruloj » (Monato, 11/82, p. 13, Kial ne Zamenhof).

Psikologoj, eble, i.a. povus, gastalt- kaj transfer-teorie, klarigi la ĉefkaŭzon de tiu ne volonta malrapid-legado.

Nu, ĉu, fakte, pontlingvo ne bezonas ankaŭ pont-gazetaron por traligi la komencantojn al la verkoj de arto-plenaj vort-majstroj ?

Feliĉe, nun post la prova n-ro de « Esperanto », oni lanĉos konstantan facilan parton en Kontakto (esperanto, sep. 1982, p. 154 ; okt 1982, p. 173). Facila n-ro de Esperanto, kaŭzis sensacion en IE, ĉu en komencaj klasoj, ĉu en post-komencaj kaj progresintaj. Feliĉe, Anna Brennan, la redaktorino de facila Esperanto solvas la problemojn jene :

« En recenzo, kiu aperis en la oktobra n-ro (1982) de ĉiu revuo, Klaus Schubert skribis : „...infanoj kaj komencantoj estas du malsamaj literaturpublikoj...”. Lia recenzo temis pri materialo por la unua el tiuj du grupoj. Nun mi volas konsideri la duan, la komencantojn.

Kiam mi redaktis la facilan prov-numeron de Esperanto, kiu aperis antaŭ precize unu jaro, mi celis montri, interalie, ke « facila revuo » ne estas sinonimo de « infana revuo ». Laŭ la komentoj de la legantoj reage al la n-ro, estis evidente, ke multaj homoj

ĝuis la n-ron malgraŭ ĝia enhavo » (esperanto, nov. 1982, p. 183).

Por esprimi la gravecon havigi al E-o ankaŭ revuon facilan, necesas rakonti epizodon : Profesoro pri Angla, en iu klaso de Nacia Universitato de Irano montris anglalingvan facilan revuon, kiu uzis nur 700 vortojn. Aludante al E-o, li diris ke ankaŭ anglan oni povus utiligi post ne longa studado, kaj scio pri nur 700 vortoj. La kurson ĉeestis ankaŭ la redaktoro de sciencaj kaj E-aj paĝoj de magazino Gavanan (esperanto, dec. 1981, p. 209).

Li tuj almontris tiun facilan n-ron de Esperanto, kaj diris, ke : « En parto de tiu ĉi revuo E-a, oni utiligis nur 500 radikojn, kaj tre elegante esprimis diversajn materialojn ! ». Tiu nura demonstacio pli bone ol cent argumentoj konvinkis la skeptikan profesoron, kaj ŝanĝis kontraŭ-E-an atmosferon en iun amikan. Vere, oni bezonas tiajn tuŝeblajn rimedojn por ŝanĝi multe da similaj antagonismaj atmosferoj kontraŭ E-o en la Tria mondo !

Ekzisto de tiaj facilaj revuoj helpas ankaŭ instruistojn de porinfanaj kaj junularaj kursoj interesi ilin daŭrigi E-an kurson.

(3) — Laŭ la « Heroldo de E-o » (20 nov. 1982, n-ro 14, p. 2), lastatempe okazis en iu belga lernejo, 98 persona klaso por infanoj. Tio estas tre grava okazaĵo, kaj indus ke, H de E aperigu ankaŭ la adreson de la koncernaj instruistoj kaj direktoro, kaj E-istoj el ĉiuj landoj ilin lertedankus. La plejmulto de niaj imponaj movadanoj estas tiuj, kiuj konatiĝis kun E-o en sia junaĝo ; ekz. Privat, Hodler, en unua epoko, kaj Tonkin, Sadler k.a. en la nuna erao. La menciita n-ro de H de E abunde enhavas fotojn pri junularo. Ankaŭ tio estas tre laŭdata, ĉar 55 % ĝis 60 % da loĝantaro de tria-mondaj landoj, estas malpli ol 20 jaraĝa. Demografie, do, estas rekomendinde al H de E kaj aliaj E-aj periodaĵoj pli konscie, kaj pli multe, aperigi prijunulajn fotojn kaj temojn. Alie, ili vidos plie E-on, kiel emeritan hobion, kaj aferon !

Laste, se iu bonvoleml(in)o, el « perfekta mondo », dezirus helpi iujn tielnomitajn « evoluhomojn » en iuj « evolulandoj », ĉu tio kontraŭkuros la grandecon de iuj aliaj « perfektaj homoj » ? !

Raportis : (S-ro) Ahmad R. Mamduhi
120, Kh. Golnaz Shamali
Sadegie (Aryashahr)
Tehran-14/516, IRAN.

Notoj :

- (1) — Iran-Esperanto-Labor-Grupojn gvidas universitata profesoro, d-ro M.H. Saheb-Zamani.
- (2) — Iran-Esperanto-Raportoj, servas kiel Internacia Gazetara Servo (I.G.S.). Do, ni estus dankaj por libera publikado de tiu ĉi raporto, kaj informoj pri ties aperigoj.

FRUKTOJ DE LA SPACO

Mini-elektroniko kaj poŝ-komputeroj

Komputeroj estas la ŝlosilo de la Spaca Konkerado. Elpensado kaj ellaborado de preskaŭ ĉiuj elementoj de la spaca veselo, la precizega kontrolo de la maŝino dum flugado, la klasado de ĉiuj donitaĵoj transdonitaj laŭlonge de la misio en la Spaco permesis ege progresigi la teknologion de la komputeroj; ĉar pezo kaj volumeno de la spacaj veseloj estis strikte limigitaj, oni ellaboris rimarkindajn cirkvitojn ege malgrandigitajn, kiuj baldaŭ ekipos komputerojn baldaŭ lanĉitaj sur la merkato. Tiu ega malgrandigo permesis ioki milojn da cirkvitoj en skatolo pli malgranda ol ungo de polekso. Tiaj komputeroj baldaŭ ekipos kontrol-sistemojn en aviadiloj, en aŭtomobiloj, en industriaj maŝinoj, en konstruo-industrio, en mina industrio.

Programigado de komputeroj utilos ĉe aer-transporto por tuja rezervado de lok-biletoj, ĉe banko kaj asekuraj kompanioj por plibonigi la kontado-operaciojn, ĉe borsoj por faciligi merkatojn kiuj ĉiutage okupiĝas je pli ol 20 milionoj da akcioj, kaj ĉe Medicino por aŭtomatigi hospitalajn servadojn aŭ starigi kompleksajn diagnozojn.

Numera kontrolo kaj numera logiko por il-maŝinoj

Spacaj programoj kondukis al fabrikado de pecoj komplikaj kaj necese plej perfektaj: por fronti tiujn rigorajn kondiĉojn nepre necesis sistemo ebliganta aŭtomatan kontrolon de la maŝinoj pere de instrukcioj programigitaj sur traruitaj kartoj aŭ bendoj, kiuj anstataŭas operacianton, kailibrilojn kaj manajn kontroladojn.

S-ro Willard F. Rockwell Jr., amerika industriisto deklaris: « asocio de numera kontrolo kaj komputero kun il-maŝino estas unu el la plej rimarkindaj teknikaj novigaĵoj de nia epoko; nuklea energio, spaca flugado kaj renovigo de la il-maŝino estas same ĉefaj realigoj de nia generacio ».

Ne nur pli ol 80 % el la pecoj estos uzinitaj sub numera kontrolo — kio konsiderinde pliiĝos rendimenton kaj fidecon ĉe la produktado — sed plue ĝi permesos al la Administracio de la entreprenoj pli bonajn decidojn dank'al sciigoj pli precizaj, pli kompletaj kaj pli rapide ekhavitaj.

Kun la nerezistebla logiko, kiu ilin karakterizas, la sistem-konceptoj kunigigitaj al numera

kontrolo penetras ĉiujn aktivaĵojn de unu Kompanio. Ili skuas, stimulas, defias ĉiujn membrojn de la personaro (de la laboristoj al la supra direktorado). Ili permesas al la laboristo liberigi je la teda rutino de la ĉen-laboro kaj al la inĝenieroj sin tute dediĉi al taskoj pli kreaj. Ili malpliigas distingon inter elpensado kaj ellaborado en la unika procezo ellaborita de la komputero.

Kreado de transistoroj, kaj precipe kreado de integritaj cirkvitoj, ebligis konstrui de elektronikaj komputeroj ne pli grandaj ol ŝu-skatolo sed sufiĉe fidindaj por kontentigi la postulojn de interspacaj flugadoj.

En Francio la Centra Laboratorio por Telekomunikadoj efektivigis helpe de integritaj cirkvitoj, kalkulilon, kies volumeno egalas tiun de portebla tajpilo. Sen tiuj transistoroj spaca esplorado kaj allunado estus neefektiveblaj en nia jarcento pro pezo, dimensioj kaj energio-konsumado de la elektra ekipaĵo de niaj aviadiloj. Nur tiuj « elektronikaj cerboj » uzante mikro-organismojn permesis ellaboradon de la spacaj esencaj sistemoj.

Tamen komputero kun transistoroj signis nur komenciĝon, en la monda elektronika industrio, de tuta revolucio, kiu okazigis ekonomikajn miraklojn. Nova ondo de elektronikaj aparatoj — de horloĝo al komputero — dikaj kiel paperfolio kaj entenantaj pli ol mil elementoj (inter kiuj kalkulilo granda kiel cigar-skatolo kaj 1 500 gr-peza) amase fluas el Japanujo, sen bruo laboras kaj anoncas la liliputan invadon, kiu radikale transformos Aferojn kaj Administracion.

« Registro-Skatoletoj », hejme kiel diskoj

Jam fundamentan transformon alportas elektroniko; krom libroj, la biblioteko baldaŭ entenos « Registrad-Video- Skatoletojn ». Tia Video-Skatoleto estis kreita por la fota ekzameno de la Luno; ĝi similas magnetan bendon por magnetofono, sed ĝi entenas, kun la sono, registritan bildon; oni ĝin enigas en televid-aparaton kaj jen hejme, por la publiko elekteleblan filmon, por la studento aŭdo-vidan instruadon, por televid-kompanioj konkurenton, kiu devigas al pli bona produktado por medicino plej interesajn dokumentojn.

Por la filozofo Marshall Mc. Luhan, fino de la Gutenberg-Galaksio kaj komenciĝo de la Bildo-Civilizacio.

Nova vidpunkto

Nia moderna elektronika vivo klare montras, ke Ŝtatoj aŭ Grandaj Societoj frontas opajn problemojn, kiuj postulas opajn solvojn. La ĝisnuna fragmenta ellaborado alportas ne-taŭgan solvon al la urĝaj problemoj de nia tempo kaj ne plu povas estri la teknikon necesan al la nuntempa homaro; la empiria maniero, kiu, ĝis nun, igis, ke oni transiru ponton, kiam oni ĝin atingas aŭ ke oni solvu problemojn laŭ mezuro kiam ili prezentiĝas, ne plu estas pensebla en la spaca erao.

En la Apolo-programo, ĉiu el la elementoj (de la lanĉad-areo ĝis la kapsulo-reprenado en la oceano) rilate homojn, medion kaj ekipaĵon, estas parto el precizega sistemo; ĉiuj elementoj devas esti strikte ligitaj inter si kaj ĉiu el ili devas kontribuis -laŭ bone determinita procezo — al la fina celo.

Preciza analizo de ĉiuj sistemoj povas certigi, je perfekteco almenaŭ 99,999 % ke ĉiu elemento bone funkcias en sia propra loko kaj ke ĉiu homo plej bone efektivigas sian taskon. Kompreneble nur komputero permesis tiun kombinadan de tuta superrigardado kun zorga studo de ĉiu detalo.

Sed ankaŭ nova vidpunkto pri homo kaj ĝia medio intervenis. Maro, Aero kaj Spaco estis longtempe konsideritaj kiel apartaj elementoj; de nun oni rigardas ilin kiel asociatajn mediojn, larĝe malfermitajn al la homaj aktivajoj.

La nova teknologio nune ellaborata ĉirkaŭas kaj ekspluatas la Tuton el la homaj sciencoj: Beletroj, Socialaj Sciencoj, Naturaj Sciencoj, Ekzaktaj Sciencoj.

Apolo-eksperimento demonstris, ke, konformigante al la programo antaŭe fiksita, kaj spite miriadan da nepercepteblaj kaj nekonataj faktoroj, oni povas sukcesi kaj ekhavi la deziratajn rezultojn en agosfero tute ne esportita.

S. Guillot.

KELKAJ NOTOJ PRI LA AŬTORO DE « LA PROFETO »

Por plenumi la deziron de kelkaj amikoj, kiuj bonvolis interesiĝi pri mia traduko ĵen, resume, kelkaj informoj :

Khalil Gilbran estas Libanano. Li naskiĝis en la jaro 1883 kaj mortis en 1931. Sian vivdaŭron li pasigis parte en sia hejmlando, parte en Francio (ĉefe en Parizo), kie li studis pentroarton kaj konatiĝis kun Rodin, Debussy, Maeterlinck, Rostand, parte en USONO, en Boston kaj Novjorko. Li ankaŭ veturadis tra la mediteraneaĵ landoj. Al la araba literaturo finjarcenta li donis gravan impulson kaj akcelon. Lia plej famkonata verko ĝuste estas « La Profeto », kiun li aperigis en la jaro 1923 unue en la araba, poste en la angla; li mem reverkis la tekston en la angla lingvo, sed multfoje prilaboris ĝin. Tre postulema al si mem li estis sur literatura kaj poezia kampo. La verko estas tradukita ankaŭ en la franca. En la franca eldono la teksto dividiĝas en mallongajn paragrafojn, kiuj redonas la ritmon de la versprozaĵo. Gilbran mortis en Usono sed lia korpo estis reveturigita al Libano.

S. BONIOL.

LA MASTRO DE KERBOJA, AMROMANO EN KAMPARSOCIA STRUKTURO

Al siaj sovetaĵ samideanoj la blinduloj ŝuldas branĵan eldonon de elstara estona literaturaro. Dankesprime mi provos ĝin diskonigi al la scivaua legemularo. Nur antaŭ unu jarcento kaj duono ekestis la estona literaturo. Sub la pseŭdonomo Tamsaare kaŝiĝas la verkisto de « LA MASTRO DE KERBOJA » (1878-1940). Naskiĝinte en kamparana familio li pasigis siajn infanĵarojn en arbara kaj marĉa regiono. En la preparolara romano (la unua, 1922), li vigle priskribas la vivbatalon de la tieaj kamparanoj kaj ties animstimulojn. En la verko kunestas humuro, satiro kaj liriko. Tian miksaĵon el realismo kaj poezia pentrado eminente respegulas la Esperanto-tradukaĵo pere de tute aparta stilo, kiun ĝuos la leganto laŭlonge de la ĉi-subaj eltirajoj. Notindas tamen kelkaj nekutimaj: interalie la anstataŭigo de « diri » per « voli » kaj kelkaj terminoj pri landaj kreskaĵoj, kiuj ne kuŝas en P.I.V. Unu post alia mi klopodos resumi la 23 sinsekcajn ĉapitrojn kaj kiel eble plej ofte lasos la parolvicton al la verkinto kaj al la ĉefroluloj.

1 — Sur la farmbieneto KATKU la juna VILLU vekigas en fojnejo. Ĝus ellasite el malliberejo post vilaĝaj kvereloj kaj brutalaĵoj li finfine vekigas hejme. Jen la renkontiĝo kun la korusiŝta patrino, kiu venis detranĉi lardojn kaj rimarkis ion nenormalan en la hunda sinteno; kaj jen la renkontiĝo kun la patro, hardita kamparano kvankam fundfunde bonkora. Oni sciigas al ni, ke VILLU estas unuokula; ke li interbatiĝis pro sia amatino EVI, kiu dum lia puntempo naskis infanon kaj pro tio estis kvazaŭ forpelita el la bieno KERBOJA, kie ŝi estis dungita kiel servistino. Nun ŝi loĝas en mizera stato en la domaĉeto de sia patrino kaj vartas sian vigan fileton, kies nomo estas VILLU -kiel la patro.

« Kantis silvio, ĉirpis rubekolo, fajfis malfraŭa sturno, kiu la unuajn idojn ne sukcesis elkovi, aŭ kiu tro malfrue trovis konvenan lokon por sia nesto; kiris pego en proksima arbaro, kukuŝis kukolo, voĉumis motacilo, koncertis eĉ tiuj birdoj, kies nomojn VILLU ne sciis, eĉ ne ĉiam aŭdis, sed kiujn li konis laŭ ilia kanto. Aŭdu, post mallongaj paŭzoj tie iu ripetas: viuv! viuv! Ĝi ripetas tion per iom rauka, kvazaŭ multvoĉa sono, en kiu estas kvazaŭ kvietaj malĝojoj. Tiun voĉon VILLU scipovas kompari kun nenio, eble nur kun iu sono de harmoniko, kiam sur la klavoj estas dampilo, sed li scias, ke tiu birdo havas verdan ventron kaj ŝatas loĝi en granda arbaro kaj sur altaj arboj. Iu alia birdeto komencas sian kanton per tio, ke ĝi per sia longo vibrigas belan « r », post tio ĝi triligas longegan kaj komplikan arion kaj finas per la sama daŭra « rr », al kiu ĝi kiel punkton aldonas « t ». Aŭskultante, VILLU ekmemoras la brunetajn dorson kaj voston de la birdeto, la same superlevitan voston, kiel la trilanta beko. Kaj ĝi rr-as kantas, kantas kaj rr-as tiel, ke estas plezuro ĝin aŭskulti ».

2 — Elirinte por sin bani en la lago, VILLU malkovras piedsignojn de virino apud spuroj de hundo. La patrino konfirmas lian supozon: onidire ANNA, la « fraŭlino de KERBOJA », malsaneta, revenis el la urbo. Ŝia maljuna patro REIN, ne sukcesinte aĉeti KATKU-bieneton de la malcedema patro de VILLU, intencas transdoni al Anna ĉiun respondecon.

Kiam Villu kaj Anna estis geknaboj, ili trukuradis la arbaron kune kaj Villu elpikis sian dekstran okulon pro streĉo de branĉo, kiun Anna pafis liavizagen. La patrino de Villu antaŭtamas, dum ĉi lasta, vera amanto de Katku, de soleco kaj de praa naturo, estas korpemata de antaŭtempa sento pri maljuniĝo.

3 — « Villu de Katku laboregis, laboregis kun tia forto kaj persisto, ke la unuan fojon en la vivo eĉ la patro estis kontenta pri li, ĉar neniam antaŭe Villu tiel laboregis en Katku. Villu mem opiniis, ke li devus fari ankoraŭ pli multe, multoble pli. Villu observis kaj rezonis, la unuan fojon Villu konatiĝis kun sia patro bieno, kiel estonta mastro; ĉar kiu scias ial, sed subite Villu eksentis sin, kiel estonta mastro de Kerboja ».

(Antaŭe li estis ŝakristo kaj kun aliaj samspeculoj sekrete fabrikis « plezurigilon », nome brandon; sekve li drinkis, furioziĝis kaj trafis en malliberejon).

Kvankam en plena malkonsento kun la patro, li obstine decidis ekspluati iom flankan parton de la bieno: KIVINE (laŭvorte: « ŝtona monto »), asertante, ke sub la ŝtonaro kuŝas humoriĉa grundo. Li do ekboras truojn en la ŝtonoj por poste eksplodigi ĉi lastajn per pulvo kaj dinamito. Dum li meditadas, disfendadas kaj pafadas, la obsedo pri la rimarkitaj postsignoj eĉ la lago lin turmentas. Dum la pentekostaj tagoj li preferas solecadi kaj labori ol partopreni en la junulara festo. De la patrino li tamen ekscias, ke Anna siaflanke partoprenis en ĝi kaj de mandis pri li. Tiaj sciigoj ege konfuzas lin.

4 — Post la Katku-anoj -enfermigeaj, kvazaŭ sennuancaj primitivuloj-, jen la Kerbojanoj.

Hejmenreveninte por Pentekosto, Anna interparolis kun la patro, kiu petis de ŝi, ke ŝi definitive forlasu la urbon kaj loĝu sur la bieno. Senresponde tamen ŝi forveturis. La patro ekmiras kaj pridiskutas la aferon kun sia fratineto, la duon-blinda duon-surda maljuna MADLI. Nek unu nek la alia kapablas decifiri la psikon de la junulino.

« Por Kerboja estus necesa juna homo, kiu ĉion vidus kaj aŭdus kaj kies piedoj sin portus ĉien... Ŝiaj ostoj kaj karno devenas de ni, sed la sango estas alia, tute alia. Neniu scias precize kion ŝi pensas aŭ kio kaŭzas al ŝi doloron, ŝi eĉ mortos tiel, ke neniu scios precize, kial ŝi mortis ».

Ni estas sciigataj pri estintaj familiaj eventoj, Oskar; la frato de Madli kaj Rein, antaŭlonge aĉetis la bienon, sed ne ekspluatante ĝin persone. Li petis de Rein (tiam instruisto), ke li ĝin admi-

nistru. Sed granda revemulo estis Rein, kiu imagis al si fabelan bienon. La edzino de Rein formortis. Kial? Pri tio scias neniu. Pro troa soleco? Povas esti. Nur filinon ŝi naskis. «Kun filino, plendas Rein, estas tia afero, ke ŝi konformigas al la volo de la edzo — eĉ filoj dancas ofte laŭ muziko de sia edzino». Oskar siaflanke, forlasite de la edzino, sin mortigis per doloro. Rein demandas sin je kiu ŝi edziĝis:

«Villu eble taŭgis kiel mastro, sed kiel bofilo tute ne. ... Kérboja estas senkompata deviganto, senkompata laboriganto, kiu ĉirkaŭiras kun forta bastono en la mano. Neniu ĝi indulgis, al neniu ĝi permesis ripozon, eĉ ne al la mastro mem kaj ĝi faros tion ankaŭ estonte, certe faros. Ĝi lacigas ĉiujn, skurgas ĉiujn ĝis morto».

5 — Rein atendadas la filinon kun jam ne spertita interesiĝo, ĉar li antaŭsentas, ke io grava estas ŝanĝigonta en lia vivo. Anna vortigas la konkludon:

«Tiam zorgos mi kaj mi katenos min mem: kaj ankaŭ vin al la aferoj de Kérboja. Ekde hodiaŭ ĝis via morto ni vivos en Kérboja sub ĝia devigado, kiel plenumantoj de ĝiaj ordonoj, kiel ĝiaj servistoj, ĝiaj sklavoj. Nur en unu rilato ne estos liberaj: duope forkuri de ĉi tie. ... — Sed kiu farigos mastro de Kérboja, demandis la patro. — Patro, tion mi ne scias, respondis Anna ridetante. La mastron por Kérboja serĉos mi, tio estu mia zorgo».

6 — Anna senprokraste transprenas sian mastrian taskon kaj inspektas la fojnokolektantojn. Kaj surprizegis ŝi naskas ĉe tiuj bonaj servistoj.

«Ŝi havas kvazaŭ formikojn en la pantalone, nur ĉirkaŭiras, nur flugas», jam pasintfoje ili komentis. Sed hodiaŭ:

«Ne plu fraŭlino, diris la fraŭlino tiel, ke ĉiuj ŝin aŭdis, sed mastrino. De la hodiaŭa tago mi ne estas plu fraŭlino de Kérboja, sed mastrino de Kérboja. Hodiaŭ mi prenis la kondukilojn en miajn manojn. Sed kiu farigos mastro de Kérboja, demandis la laborestro Mikk ridetante kaj ĉiuj ridetis bonvole kaj konteme. — Provizore restos la malnova ĝis la nova estos trovita kaj mi plenumos liajn devojn. — Tio signifas, ke la fraŭlino estas samtempe mastrino kaj, daŭrigis Mikk. — Tiel estas kaj tiel restos ĝis la nova mastro transprenos la bienon, diris la mastrino de Kérboja».

Por enigi en ĉies kapon, ke de nun la mastrino estas ŝi, ŝi aranĝas feston en la tago, kiam koincidas ŝia datreveno kaj la antaŭespera johan tago. Oni venigu ĉiujn ajn, inkluzive de la Katkuanoj.

«La falĉaĵo nur flugis en ventimpetoj, flugis kvazaŭ per propra forto, el propra volo en amasetojn, de tie sur sledojn, kiuj havis lignajn glitilojn, de la sledo sur forkon kaj de la forko ĝi saltis, hop! en la fojnejon. Ĝi flugis kaj suris, saltis kaj siblis, kvazaŭ por tempopasigo konversaciis kun la fojnantoj, konversaciis kaj odoris ebrige, kvazaŭ ĉasta virgulino, kiam ŝi vespere antaŭ Johantago forlavis de sia juna korpo laborŝviton, vestas sin per puraj vestoj kaj iras rigardi, kiel junuloj ekflamigas fajron; iras aŭskulti, ĉu muziko jam sonas por povi per

danco moligi sian korpon rigidigitan pro laboro».

7 — Anna dediĉas la tagon al hejmaj kaj ĝardenaj laboroj. Poste ŝi sidas sur difektiginta benko en ĝardeno kaj rememoras sian lastfojan sidadon sur ĝi.

«Ŝi estis tiufoje tiom kolera pro honto, ke ŝi grincigis la dentojn, ke ŝi pensis pri sinmortigo, pensis, ke ŝi neniam plu volas vidi lin, nek aliajn homojn, aliajn virojn. Eĉ ĝis hodiaŭ ŝi ne estas en la fundo de sia koro, en sia interno plene pardoninta al la hontiginto, al sia koloriginto. Kiam ŝi vidis lin meze de la lago sur la flavblanka sablaltajo en sunbrilo rektigi sian korpon kaj aŭdis lin ĝojkrii kvazaŭ en natura ĝojo, ŝi sentis en sia sango, en siaj kornervoj la saman koleron kaj doloron de honto, kiu turmentis ŝin tiam, kiam ŝi per hazarde kapita bastono donis ien furiozan bategon kaj kuris en malekaj vestoj per sia tuta forto ĝis ŝi ekspiregis, senfortiĝis. Kaj hodiaŭ? Ĉu li venos hodiaŭ al la johan taga fajro aŭ ne venos? Anna eĉ mem ne sciis, ĉu ŝi volas, aŭ ne volas, ke li venu».

La sendito sciigas nean respondon de Jüri (la patro de Villu) kaj duban respondon de la filo. Ĉi-okaze Rein elvokas la disvolvigon de la interfamiliaj rilatoj.

«Jam de la komenco ni malpacas. Ni volis aĉeti «Katku», aŭ almenaŭ tiujn herbejojn, kiujn Katku havas apud nia herbejo ĉe la rivero por tiel rondigi la terposedaĵon de Kérboja. Jen la kaŭzo. De tiu tempo li (Jüri) rilatas al mi malamike».

Anna siaflanke elvokas sian konatiĝon kun Villu:

«Komenciĝis senforte, komenciĝis per tio, ke Anna vidis, ke Villu konfuziĝis, vidis, ke li rugiĝis, ke ankaŭ ŝi mem versajne konfuziĝis kaj rugiĝis, starante inter la patro kaj la onklo kaj rigardante la altkreskan knabon».

Kaj Rein klarigas plu:

«La ĉefa kaŭzo estis kaj estas ankoraŭ nun tio, ke ni estas homoj el alia regiono, fremduloj, enmigrintoj, kaj ili ĉi tie ne ŝatas fremdulojn».

Cetere Jüri ne havis sufiĉe da mono por aĉeti «Kérbojan» — eĉ Oskar la frato ne havis sufiĉe ne pruntepreninte. Kaj tion Jüri neniam pardonos. Li taksas la Kérbojanojn almozpetantoj pri tero pro tio, ke ili ne perlaboris mem sian havajon. Kaj Rein komentas plue pri la okazintaĵo en la vivo de Villu:

«Ekzistas homoj, kiuj nenion povas fari ne perdante prudenton; tia homoj li estas. La maljunulo (nome Jüri) plene pravas, kiam li grumbas, ke la filo faras vanan laboron, kaptas venton, kiel li diras».

Kaj la verkisto konkludas jene:

«Estis kiel ajn, sed al la mastrino de Kérboja tiu vento-kaptanto ekplaĉis pli kaj pli. Li estas siamaniere malprudenta, kia estis ŝi mem, kiam ŝi decidis fariĝi mastrino de Kérboja. Kio ligitis ŝin al Kérboja? Instinkta impulso pli potenco, ol prudento».

8 — Febra festopreparado en Kérboja, «Kvazaŭ estus printempa inundo, kiam sur la apudrivera herbejo oni en fajro-lumo kaptas fiŝojn». Ĉirkaŭ la johanfajro Anna vidas ĉiujn

konatulojn kaj nekonatulojn, escepte de la Katkuanoj kaj de Evi. Ŝia patrino malsaniĝis kaj ŝi devas prizorgi la domon kaj la infaneton. Sed ĉe Villu ŝia penso daŭre restadas.

Villu ŝiaflanke intencis fuŝi la feston drinkigante la plej lertan muzikanton, kiu « blekas kaj ĝemas distirante kaj kun-sovante la balgon de sia harmoniko ». Sed drinkinte siavice li reatingas la muzikludanton survoje. Tamen li ne kuragaŝ sin montri ĝis la mastroino mem lin salutas kaj petas, ke la raketojn pafu li.

« Subite ĉiuj sentis, ankaŭ Villu mem sentis, ke eble signifas nenion, ke li estis en malliberejo pli ol unu jaron pro tio, ke li mortbatis viron, ke li en ebria stato uzis palison, kiam la alia venis kun longa tranĉilo ».

9 — La festo. Sur la lago sole veturas la mastroino kune kun Villu kaj la raketoj. Silentado.

« La mastroino de Kérboja sentas hodiaŭ, ke ne estas bone, se tiel rapide estingiĝas ekbrulantaj fajroj kaj ludantaj ombroj, ĉar ŝi serĉas, ŝi sopiras ion pli daŭran, ŝi pensas pri io, kio havas parton de konstanteco, eble eĉ de eterneco. ...Villu fabrikas por si servodrakon, kiun li volus sendi alporti feliĉon, sed ili ĉiuj kvazaŭ pli frue ekflugas, ol la mastro sukcesas diri al ili kien, kiel aŭ kiam forflugi. ...Neniu voko, nenu laŭta vorto sonas el la boato responde al la ĝojriloj addeblaj de la bordo, kiam super la lago krakas la bluaĵ, roz-kaj violkoloraj flamoj ».

Post raketa elpafado, laŭdone de la mastroino Villu direktas la boaton dum ŝi remas. Konversacio komenciĝas :

« Post la patro versajne mi restos, diras Villu. — Kaj mi restos en Kérboja kiel mastroino, tiel, ke mi estos najbaroj. — Sed kiu do fariĝos mastro de Kérboja ? Tia granda bieno ne povas ekzisti sen mastro. — Tion mi ankoraŭ ne scias ».

« En ŝia voĉo estas io, kio atentigas « Villu », ke li agis iom nesingarde, ĉar lin oni ja ne dungos kiel serviston, sed li venos mem, venos kiel svatanto, venos kun dolĉa kaj sonoriletoj ĉe la flanktimonoj, kun tintiloj ĉirkaŭ la kolo de la ĉevalo ».

Interbabilado laŭ ŝerca tono, sed pri seriozaĵoj. Kiel mastrumus li, se li estus mastro de Kérboja ?

« Pri tio mi neniam pensis. — Sed pensu do, pensu hodiaŭ vespere, pensu ĉi tie en la boato, pensu kune kun mi, helpu al mi pensi, ĉar mi devas tion scii, kaj mi havas neniun kun kiu konsigli, parolas la mastroino ; kaj al Villu ekŝajnis, ke ŝi ne serĉas ».

Li porkomence zorgus pri la konstruaĵoj, prunteprenus monon, aĉetus laborilojn kaj brutojn, prisemus novaĵn kampojn, ĉirkaŭigus la tutan bienon per kanaletoj por malhelpi supeakviĝon ; pli poste li amasigus krudmaterialojn por gudrodistilado kaj paperfabrikado. Kaj sen pripense li prialdudas sian restadon en malliberejo.

10 — « Oni pensis pri la johanfajro kaj dancis, oni pensis pri tiuj fajroj, kiuj ekbrulis samtempe en la ĉielo kaj en la lago, kaj ilia dancemo nur kreskis. Oni dancis tiel, ke la tero dispeci-

ĝis, oni dancis tiel, ke oni forgesis eĉ la mastroino de Kérboja, kiu kune kun Villu de Katku veturis sur la lago ».

Trinkinte el sia botelo por kuraĝigi sin, Villu dancigas la mastroinojn :

« Dancigis ŝin tiel, ke hodiaŭ vespere ŝin ankoraŭ neniu dancigis. Villu ekhavis impeton, lia humoro pliboniĝis, li infektigis de sovaĝa duon-konscio tiel, ke li dancis, saltis kaj piedfrapis, kiel frenezulo. ...Li nur dancis kaj de tempo al tempo akre ekkriis, kvazaŭ li estus sovaĝulo, kiu dancante anoncas sian militkion, sian batalemon. Per sia dancado Villu lacigis la muzikiston, per sia dancado Villu senhormis la dancadon kaj oni timis « Villu », kiam li tiel dancas ».

La ĵunlaro lin incitas ; iu dancanta duopo stumbligas lin ; oni ekkverelas ĝis sendiskuta respacigo fare de la mastroino, kiu tamen riproĉas « Villu », ke li drinkis.

« Ĉu vi ne povas ne drinki ? — Kelkfoje mi povas, sed kelkfoje ne povas. Ekzemple hodiaŭ mi ne povis, mi devis drinki, hodiaŭ mi drinkos ankoraŭ, mi drinkos ĝis eble mi rampos kvarpiede, tia freneza tago estas hodiaŭ ».

Nenion komprenas Anna. Ŝi demandas, ĉu li fordrinkis sian dekstran okulon. Ili elvokas sian interkonatiĝon, sed Villu forŝoviĝas, kiam ŝi volas ricevi lian konfeson pri la maniero, kiel li perdis sian okulon. Poste ili fariĝas kundancadas.

Dume Evi travivas terursonĝon en sia kabano. Sed ĉe la lago Anna « nur dancas kaj interparolas kun Villu, kvazaŭ ŝi volus dungi lin kiel mastron de Kérboja, almenaŭ kiel ĉeflaboriston ».

Ĉiujn Villu invitas al Katku kaj al « ŝtona monto », eĉ la muzikiston kun la « bovido ». La mastroino obstine rifuzas. Por fleksi ŝian volon li anoncas, ke li pafos honore al ŝia datreveno. Nea respondo. Nu, por ilia antaŭa konateco, Persista rifuzo. Por ilia nova konateco ; rifuzo, krom se li estas plenumonta promeson : li ne drinku plu. Konsentite ! Kaj repaĝe li insistas petas, ke ŝi lin sekvu sub « la kurban betulon, al la marĉa laĝeto kaj al la insuloj », kie ili iam manĝis berojn kune.

11 — Rein miras pro tio, ke laŭŝajne la vilaĝanoj rilatis al li, kiel al egalulo. Eble kulpas la filino, kiu « malsupreniris inter simplajn mortemulojn ». Eĉ pli : ŝi amikiĝis kun tiu, kiu « ĉiuj malŝate evitas ».

Ĉiuj bienposedantoj malbridas sian langoa kaj eldiras sian opinion. Nun regas peza silento kvazaŭ restus io nedirita. Kaj fine oni prialdudas « Villu ». « Aŭdu, Kérboja, la filo de Ĵiri el Katku dancos ĝis li fariĝos mastro de via bieno. ...Mi tian en mian domon ne enlasus, tute egal-kiun, sed ne lin ».

Se la filino estus apud li li konsilus, ke ŝi ne serĉu mastron elinter malprudentuloj kaj malamikoj. Mastro venos mem. Li jam ekdormetis kiam reonis ununura pafado super « ŝtona monto ».

el prelego farota en Grésillon-de-S. Boniol dum periodo organizita de FUBE (1983)

(daŭrigota)

FANTAZIO SUR ERIKEJO

La Erikejo pri kiu mi volas sciigi vin situas en la graflando de Devon, Anglujo. Tra la erikejo fluas la rivero « DART », kaj multaj riverejoj: tial la erikejo estas nomita (DARTMOR).

Ĝi estas vasta etendaĵo de granito kovrita de torftavolo kiu etendiĝas ĝis ducent kvadrataj mejloj. Estas unu el la veraj sovaĝejoj restantaj en Anglujo. Bela kaj drama regiono kun belegaj pejzaĝoj. Ekzistas nekovritaj stepoj kie la granito iom glatiĝis pro la ventegoj blovanta; tra la erikejo, do restas senarba pejzaĝo de dolĉe falditaj montetoj; sed ekzistas ankaŭ belegaj kanjonoj kaj senfundaj torfkanejetoj.

La montetoj, la plej dramaj el la erikeja pejzaĝo estas rimarkindaj supraĵoj farite el granito kiu rezistas, kaj ankoraŭ rezistas la forton de erozio. Tra la tuta erikejo troviĝas strangaj, groteskaj amasoj da ŝtonejoj.

Displitaj tra la erikejo troviĝas restaĵoj de la prahistoriaj enloĝintoj, inkluzive de antikvaj bronzepokaj cirkloj de kabanoj, enterigejoj, kaj vicoj de stariĝantaj ŝtonejoj, kaj ankaŭ restaĵoj de la fera epoko. Ĉe la plej ŝirmitaj partoj de la erikejo troviĝas tre allogaj dometoj kiuj surhavas pajlajn tegmentojn. Belaj ĝardenoj ĉirkaŭas la dometoj, parohejoj, domegoj kaj kasteloj.

Dart Erikejo estas sorca kaj magia loko. Loko de rara belo, sed eĉ dum la plej helaj tagoj ekzistas de loko al loko sento de minaco kaj malbonaĵuro. Oni diras ke dum jarcentoj Satano pasegis tien kaj re-en elkracante fajron kaj sulfuron, kaj ankoraŭ elserĉas kaj formangas la spiritojn de la novmortintoj pere de hundaĉaro.

Diversaj bestoj havas siajn hejmojn sur la erikejo; ekzemple ekzistas meloj, vulpoj, sorikoj, arvikoloj. Poneoj libere vagadas kie ajn ili volas.

En la riveroj diversspecaj fiŝoj naĝas inkluzive de trutoj kaj salmoj. Birdoj trovataj estas buteoj, grizaj motaceloj, kaj ceteraj.

Antaŭ jaroj ĉi tiuj bestoj kaj birdoj, ankaŭ fiŝoj estis avide kaj kruele kaptitaj, sed nun la erikejo estas konservita regiono.

Kompreneble la tuta erikejo estas hantata. Diversspecaj fantomvizitantoj frekventas la regionon. De tempo al tempo oni povas vidi, ekzemple, nigran kaleŝon tiratan de kvar nigraj ĉevaloj. La veturigistoj estas skeletoj, sed malgraŭ tio ke oni povas vidi ilin, la irado estas sensona, silenta. Apude de loko nomita Hound Tor (Hund tureto) troviĝas tombeto en kiu estas la restaĵo de knabineto kiu sin mortigis antaŭ cent jaroj, kaj ankoraŭ, ĉiutage sur la tombŝtono troviĝas freŝaj floroj roskovritaj. Neniu scias kiu metas ilin tie sed laŭ oni diro la silfoj respondecas. Sur la erikejo troviĝas lokoj kie neniam birdo kantas kaj mankas ĉia specia birdo, kaj malgraŭ tio ke la suno hele brilas, tiu loko ĉiam estas malseka kaj malvarma. Foje oni povas aŭdi la sonon de hundbojgo kie neniam hundo ekzistas.

Foje personoj kiuj eniras la teritorion de la erikejo perdiĝas. Por esplori la erikejon necesas ne nur persona vigleco, sed ankaŭ racieco; kaj ne nur mapon, sed ankaŭ kompanion. Ĉe la rando de la erikejo oni povas esti sekura pro la diversaj orientiloj, abundaj kaj facile videblaj, sed vagi tien kaj reen kvazaŭ oni iras laŭlonge de urbo-centro estas la agado de stultulo. Aŭdante la sonon de fluanta rivereto oni iras en la direkton de la sono, sed la sono ĉesas, kaj preskaŭ tuj aŭdiĝas aliloke. Susuro de la vento inter gigantaj filikoj similas al la ĝemado de perditaj animoj. La subita silento post muĝado kaj akra kriado de la vento ofte estas teruriga.

La homoj ĝenerale asertas ke ili tute ne kredas pri tiaj aferoj. Leĝobeo, normala, justa persono emas ridiĉi pri superstiĉoj, sed estas vere ke diversaj homoj kredas pri diversaj aferoj, kaj ofte tiuj kredoj estas enradikitaj en la homa korpo tiel, ke oni neniam povos persvadi la homon kontraŭ la kredoj. Tamen, ĉu ne la homoj rajtas kredi pri io ajn? Ja, jes. Jen homo kiu kredas pri feinoj, tamen li rajtas tion kredi, ĉu ne? Oni kredas pri anĝeloj, diabloj, keruboj kaj tiel plu.

Ankoraŭ troviĝas en la mondo lokoj kie antaŭ multaj jaroj tre strangaj aferoj okazis. Ekzistas loko nomita Stonehenge en Anglujo. Tie troviĝas grupoj de ŝtonejoj kiuj iam havis religian signifon por la Druidoj, kaj eĉ nun ekzistas sekvantoj de la religia kulto Druidismo. Sorĉistinoj, centaŭroj, vampiroj, likantropoj — elektu nur unu el ili kaj vi povos trovi homon kiu kredas pri tiu estaĵo. En antikva tempo superstiĉoj abundis pri la erikejo Dartmoor, kaj eĉ nun la kamparanoj restas iom superstiĉaj.

Sur la erikejo ankoraŭ troviĝas misteraj lokoj kies sekretoj neniam estos malkaŝitaj. En tiu loko troviĝas marĉoj, ŝlimejoj, monolitaj, obeliskoj kaj aliaj forlogiloj. Tio estas Dartmoor. La vera, la sovaĝa Dartmoor for de la vido de iu loĝejo.

Iun tagon mi estis irante trans la Erikejon; nur promenante kun tornistro surdorse. La kreskanta, flava ulekso, kaj la eriko sin montris ĉiufanke. Rigardante trans la erikejo oni povis vidi kvazaŭ rozetan kaj flavan tapiŝon intersemite de tufoj de bruna kaj verda herbo. Diversloke stumpplenaj arboj elstaris kie dum senombraj jaroj ili defiis la elementojn kiuj penadis tiri ilin tute el la tero. La arboj eble iam estis vivantaj homoj! Oni povis imagi ke iu katastrofo trafis ilin, kaj per sorĉo arbigis ilin dum ili ankoraŭ forflugis de la diabla malamiko kiu ĝisigis al ili. Ili staris klinante antaŭe kun la branĉoj etenditaj kiel brakoj, kvazaŭ ili preskaŭ trafis la azilon al kiu ili kuris sed ne tute atingis ĝin, do ili staras klinante antaŭe dum partoj de siaj radikoj montras sin super la nivelo de la tero.

Musko kreskas dense ĉirkaŭ la trunkoj de la arboj ĝis tuj sub la unuaj artikoj; kaj la tekso de tiu musko estas mirinda. Kiam mi tuŝis ĝin mi

povus juri ke la arbo mem ekspasmas kaj maldirektis kvazaŭ mi faris maldiskretecon je ies kruro. Tiuj arboj sekvas la direkton de la riveretoj, sed la distancoj inter la arboj ne estas egalaj, kaj ofte troviĝas grupetoj kiuj memoriĝis min pri familianoj kune forflugantaj. Ioni povis vidi du grandajn arbojn kune kun eble du aŭ tri malpligrandajn, similajn alapli aĝaj infanoj; kaj ankau arbojn kiuj similis al infanoj kiuj kvazaŭ prenas la manojn de siaj gepatroj. Ĉi tiuj grupoj karne vestitaj vere aspektas kiel homoj.

La riveretoj feliĉe gorgridadas. Ili estas atestintoj de pasintaj okazaĵoj; tamen ili ne malkaŝas siajn sekretojn. Ili ne havas langojn. Ili estas fluantaj al la granda rivero kies « buŝo » estas apude de la maro.

La riveretoj; la arboj; la eriko kaj la ulekso ĉiuj kombinas por fari belan vidaĵon super kiu la suno hele brilas. Miaj propraj pensoj pri pasintaj okazaĵoj estis nur fantaziaj. La horizonto estis purpura koloro. Purpuro kiu estis brila potenco, kaj iel timiga pro tio ke meze de tiu purpuro subite aperis tufeto kies amplekso pli kaj pli grandiĝis. Ĝi etendiĝis unue malrapide, sed poste pli kaj pli rapide ĝis ĝi atingis la rapidecon de ekspresa lokomotivo.

Mi turnis por forkuri — por serĉi ŝirmejon, azilon sed mi povis vidi nek unu nek la alian.

La ŝafoj de la erikejo trankvile mordetis rezistan herbon, kaj ne atentis al la nebulo kiu alproksimiĝis.

La arboj ŝajne kliniĝis pli antaŭe kvazaŭ haltigis la nebulon kiu tamen trafis min, kaj englutis min, kaj same kiel la arboj mi etendis miajn brakojn palpe. Mi stumblis kaj falis. Miaj brakoj, ankoraŭ etenditaj ĉirkaŭpremis ion molan kaj varman. La sango tamburis en mia kapo. Rakontoj pri homoj kiuj jam perdis sur la erikejo kuris tra mia menso. Mi pensis ŝmirmejoj kaj vaglumo, kaj koboldoj? Kia estas ĉi tia fantomo kiu kuŝas sub miaj manoj. Ion movantan « kaj spirantan, kun odoro de la malseka grundo? La fantomo parolis — « Baa, baa ». Hu, nur ŝafo. Mi min turnis flanken — kaj voĉo kriis — « He-e-e, estu zorga; estu zorga ». Mi elspasmis. Inter ringeto de lumo staras vireto. « Kiu vi estas » mi demandis. « Mi estas Frederiko » « Frederiko Gnomo ». « Ĉu, Frederiko gnomo ». « Jes; Frederiko Gnomo ». Ĉu vi neniam aŭdis pri gnomoj?

(Li parolis nun fajfa voĉo)

Balbuti mi respondis « S-s-sed ne ekzistas gnomoj nuntempe ».

Do, ne ekzistas gnomoj ĉu? Nu, mi estas gnomo kaj mi defias vin kontraŭpruvi tion: Li komencis kanti —

Dum mi lernas Esperanton mi konstatas, ja, ke mi estas unu el la monda amikar'. Ĉu ankau vi?

Do, mi provas bone lerni, kaj mi lerte studas ĝin.

Se mi kune bone lernas, ja la Dio benos nin.

Esperanto bela lingvo restu ĉiam en la mondo benita de la Di.

Kuraĝigu la junulojn dum hezite la homar' amikiĝas pli kaj pli.

Kiam mi aŭdis tiun kanton mi miregis, ĉar antaŭ nur kelkaj tagoj mi mem skribis tiun vortojn. Mi demandis al Frederiko — « Kiel vi povas koni tiujn vortojn? » kaj li respondis « Nu, kiam mi ŝteliras en vian domon vi ne povas aŭdi min, nek vidi min, ĉu? Nu rigardu dum la gnomoj dancas ». Fakte ili dancis kantis dum eble duonhoro, kaj multe plaŭdis ĝis oni rimarkis, ke estas truo en la nebulo. La nebulo leviĝis kaj disigiĝis preskaŭ tiel rapide kiel flugmaŝino.

Mi suprenrigardis kaj povis vidi la sunon. Poste mi malsuprenrigardis, kaj neniu gnomo estis videbla; ĝis mi denove aŭdis voĉon. Mi malsuprenrigardis, kaj tie staras Frederiko. « Pardonu min » li diris, sed vi baras mian pordegon ». Mi flanken paŝis. Frederiko tuŝis ion sur la plej apuda arbo. Ŝtono sur kiu mi estis staranta komencis turniĝi, kaj mi vidis ŝtuparon. Dum Frederiko malsupreniris la ŝtuparon la ŝtono komencis returniĝi, kaj Frederiko diris « Adiaŭ. Ĝis la revido »; kaj li estis for.

Mi estis ankoraŭ rigardanta la ŝtonon kiam ŝafisto alvenis kaj demandis — « Ĉu vi malsaniĝas sinjoro? Vi aspektas kiel homo kiu estas vidinta fantomon ». « Nu, mi ne scias pri tio » mi respondis, sed mi povus juri ke mi ĵus vidis gnomojn dancantaj kaj kantantaj meze de la nebulo. « Ho, jes » li diris, « Oni imagas tiamaniere sur la erikejo. Oni perdas la senton de direkto. La okuloj trompas vin, kaj ŝajne okazas strangaĵoj, sed — « Ne, ne, » li diris. « Ne ĝenu vin pri tio. Miaj prapatroj, kaj eĉ mia patro multe rakontis pri gnomoj kaj koboldoj; tamen ili parolis pri pasintaj tagoj. Ne plu ekzistas gnomoj. Ho, mi ne kredas pri gnomoj. Ne.

Dum li estis parolanta li staris antaŭ la arbo kiun Frederiko antaŭe tuŝis, kaj mi vidis manon veni de el la kava trunko kaj ekpreni lian ĉapon. Li rapide turnis, sed li vidis nenion, kaj lia ĉapo estis for. « He-e-e » li kriegis « Kie estas mia ĉapo? » Mi diris nenian vorton sed komencis marŝi for dirante — « Adiaŭ Frederiko ». La ŝafisto demandis — « Nu, kiel vi scias ke mia nomo estas Frederiko.

Denove la ĉielo bluiĝis, kaj la ruĝeta kaj flava tapiŝo etendiĝis ĉiudirekte; sed nun ĝi ne estas nur eriko kaj ulekso. Ĝi estas magia tapiŝo sur kiu kuŝas nedireblaj sekretoj, kaj kiu scias kiaj sekretaj enirejoj kuŝas sub tiuj ŝtonoj antaŭ la arboj? Eble ĝuste pro tio la riveretoj gorgridadas dum ili fluas al la larĝa rivero. La erikejo eble neniam malkaŝos ĉiujn el siaj sekretoj, kaj eble iuj el tiuj sekretoj estas malkaŝitaj nur por elektitaj homoj el kiuj mi ŝajne estas unu. Kompreneble mi volos reveni. Ĉu ne oni donis al mi inviton? Mi neniam forgesos la voĉon kiu venis de sub la tero — « Adiaŭ. Ĝis la revido », nek la muzikon kiun mi eĉ nun ŝajne aŭdas. Tamen, mi sciolas ĉu iam mi povos trovi tiun lokon?

(el prelego farida en Grésillon)

Leslie R. Stiling.

POR VIA DISTRO

Solvo de la antaŭa problemo

La neuzitaj literoj estas en cirkloj :

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
A	S	F	K	R	E	V	K	I	S	R	E	P
B	K	U	C	(H)	L	A	K	T	U	K	(I)	E
C	U	N	I	R	A	D	N	A	M	B	I	C
D	B	G	T	(P)	B	E	T	U	L	R	S	B
E	T	E	R	P	O	M	(O)	I	E	A	P	T
F	P	T	O	R	A	K	D	(K)	P	S	I	E
G	M	A	N	G	(A)	A	F	(S)	M	I	N	N
H	S	A	N	A	N	A	T	S	A	K	A	A
I	E	F	(T)	E	Z	O	R	I	P	T	C	F
J	Z	T	R	E	M	O	L	E	A	F	I	G
K	A	G	O	A	I	C	I	L	C	B	I	R
L	M	L	T	(A)	G	(N)	P	I	T	A	N	G

Oni tiam povas legi : HIPOKAŬSTAN.



Nova problemo

KRUCVORTOJ

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1									
2				/					
3									
4					/				
5	/			/					
6									
7			/		/	/			
8						/			
9									

(R) = nur radiko.

Horizontale :

- 1) Ilo por la unua vertikale.
- 2) Numeralo — La reno eliminis tiun substancon.
- 3) Devus kuraci laŭ la tria vertikale.
- 4) Manĝujon por la brutoj.
- 5) Verba finaĵo — Verba finaĵo — Franca riverego.
- 6) Agi kiel laboremuloj.
- 7) Verba finaĵo — Numeralo.
- 8) Aro da du literoj (R) — Nomo de litero.
- 9) Sovaĝaj olivarboj.

Vertikale :

- 1) Disvastigo de ideoj kaj sentoj.
- 2) Adjektiva formo de la du horizontale — lo uzenda (R).
- 3) Agi laŭ leĝoj psikaj.
- 4) Difinita prezo (R) — Kemia simbolo.
- 5) Restaj — Granda sen orda kvanto (R).
- 6) Karakterizas grupon — fonetike : aliro — fonetike : devizo.
- 7) Kiu ne havas truon.
- 8) Hispana artisto en areno.
- 9) Furaĝaj plantoj.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

LA OBJEKTA KOMPLEMENTO :

ĝi estas la persono aŭ la aĵo sur kiu agas la verbo (mi manĝas panon — ni parolas pri amikoj).

REKTA objekta komplemento : sen prepozicio — kun akuzativo (mi kantas vojaĝon — mi renkontas mian kuzon).

NEREKTA objekta komplemento (kun prepozicio — sen akuzativo) (mi kantas kun vi — ni rakontas pri tiu akcidento).

SIA akompanas la komplementon (neniam la subjekton)

la lernanto prenas siajn librojn ; liaj libroj estas novaj.

Kial ? ... ĉar...



Paĉjo, kial ci ne volas, ke mi havu longaj harojn kun florojn sur la kapo ? ĉu ĉar ci estas tuta kalva sub ĉia peruko ?

Klarigita problemo



Mi ne komprenas kial vi faras tiom da demandojn ; ĉu vi nenio scias ? ĉu mi devas cerbumi dum la tuta vespero super la libroj por al vi scioj alporti ?

Por efika helpado



Panjo, jam de preskaŭ unu horo, paĉjo estas el la ĝardenon por ripari la gazontondilo ; ĉu mi povas iri kun lin por lin helpi ?

CERBUMU

Ĉiu teksto, sub la bildoj, entenas **tri erarojn**. La korektoj estos en la venonta numero de « Kulturaj Kajeroj ».

Sed viajn proprajn korektojn vi povas sendi al S-ing Guillot, 5, rue René-Blanc 74100 Annemasse.

La korektotaj eraroj en la antaŭa numero (« kunmetitaj adjektivoj ») estas la jenaj :

- trifojan, dikajn, plurfoja
- kiun, dek-minuta, ĝin
- unubrakaj, al mi, kalsonetojn

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (200 aŭstr. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (400 fr.).
Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (5,00 pundoj).
Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (75 kr.).
Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (50 mk).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).
Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10* - D ALICANTE - (975 pes.).
Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).
Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.k. 14321285 (12240 liroj).
Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatŝiō-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komeŝkega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (24 guld.).
Norvegujo : S-ro Louise Bøe Marmarv, 2A Oslo 11 (55 kr.).
Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).
Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (55 kr.).
Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771, LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).
Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Weno nah, Oak Park IL 60304 (12 us. dol.).
Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.
-



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...



L'Assemblée Générale a réuni en nombre très appréciable de « Pouvoirs », dépassant de beaucoup le quorum nécessaire aux délibérations, mais un nombre de présents que l'on aurait aimé plus important. C'est à cette occasion que peuvent être demandées des explications sur tel ou tel point des rapports. C'est à cette occasion que peuvent être faites des suggestions aussitôt discutées. Des sociétaires nous en ont envoyés encore cette année. Certaines correspondaient à des expériences déjà faites dans le passé puis abandonnées. D'autres ont paru irréalistes ou même contradictoires. Depuis trente ans la M.C.E. a évolué. Seulement la M.C.E. ? A Grésillon on a en fait tout simplement suivi l'évolution des besoins créés au cours des années. Est-ce un bien, est-ce un mal ? Faut-il revenir en arrière ? L'organisation de « soirées couscous » réglera-t-elle la question de l'animation ? Des « soirées saucisses » ont déjà été organisées à l'insigation des participants, mais elles n'ont jamais été considérées comme primordiales, bien qu'elles aient été une occasion de chanter en chœur, en Esperanto bien entendu, car n'oublions pas que Grésillon existe avant tout pour l'Esperanto. Les activités traditionnelles ne plaisent pas à tout le monde, c'est vrai. Il semble malheureusement que certaines innovations ne plaisent guère plus. Les jeunes ne viennent pas suffisamment à Grésillon ; c'est vrai et nous sommes nombreux à le déplorer. Viennent-ils davantage dans les groupes locaux ? Les groupements de jeunes espérantistes progressent-ils plus que les autres ? Un aspect du problème ne serait-il pas que l'Esperanto possède quelques grands prêtres qui croient peut être autant en eux mêmes qu'en la langue internationale et qui ne parviennent pas à donner la « foi » qui seule peut entraîner les jeunes. Le « réalisme » est affaire d'adultes. Il faut d'abord croire à l'Esperanto puis choisir ou susciter l'activité qui plaît. Une expérience de trente ans semble montrer que les gens viennent à Grésillon pour l'Esperanto mais que la date a plus d'influence sur leur choix que l'activité principale proposée. Pour beaucoup le choix se fait sur place et il arrive que l'activité qui semblait la plus importante soit purement et simplement ignorée, sans pour autant que l'Esperanto y perde. C'est pour cela qu'une partie de l'animation est souvent mise en place « sur le tas » selon les désirs et avec la participation (au moins souhaitée) du plus grand nombre. Il semble que maintenant le programme préfabriqué dans ses moindres détails ait la faveur de certains. Nous continuons cependant à penser que l'animation n'a de valeur que si elle fait de chacun un acteur et non un spectateur. Mais tout cela sans contrainte car unanimité et liberté ne peuvent pas coexister surtout pendant une période nommée « libretemps ».

Le compte-rendu des travaux de l'Assemblée Générale et du Conseil d'Administration qui suivit vous permettra l'espère de trouver réponse aux questions que vous auriez posées si vous aviez pu assister en personne à ces travaux. Même posées par écrit vos questions sont la preuve de votre intérêt pour la marche de la M.C.E. A travers toutes ces questions apparaissent des tendances, des désirs, des idées qui peuvent être prises en compte ou non dans l'immédiat mais qui ont un double mérite : donner peut être une impulsion ou une direction à la conduite de la Maison et aussi amener des réponses qui permettent à ceux auxquels elles s'adressent de mieux connaître la réalité, bonne ou mauvaise, des choses et éviter les inutiles « il n'y a qu'a... ».

Mélancolie ? Réalisme ? Peut être l'idée qu'un changement est souhaitable mais aussi l'impossibilité de voir actuellement d'où il pourrait venir. Les mêmes idées se perpétuent avec les mêmes hommes et il faudrait sans doute changer les hommes. Mais alors là...

P. BABIN.

INTER NI

Multaj membroj de la Asocio sendis mandatojn por la Ĝenerala Kunveno sed malmulte ĉeestis. Tiu kunveno estas la ĉiujara okazo fari demandojn kaj proponojn pri la aktivado kaj la financoj de la Esperanto-Domo. Pluraj estis faritaj perletere. Ili estis pridiskutataj. Kelkaj estis taksitaj « nerealismaj » aŭ eĉ kontraŭdiraj. En 30 jaroj la Esperanto-Domo evoluis. Ĉu nur E.D. ? Ĝi fakte adaptiĝis al la evoluo de la homaj bezonoj. Ĉu bone ? Ĉu malbone ? Ĉu necesas reen-iri ? Ĉu la organizado de « kususo-vesperoj » solvas la problemon de animado ? La tradiciaj aktivadoj ne plaĉas al ĉiuj sed ili plenigas la kastelon kaj novkondukaĵoj bedaŭrinde ne renkontas merite grandan sukceson. La gejunuloj ne sufiĉe venas al Gresillon. Pri tio ni konscias kaj tion ni bedaŭras. Sed ĉu ili volonte vizitas renkontojn ne organizitajn de ili ? Ĉu la junulaj asocioj multe pli kreskas ol la aliaj ? Eble la problemoj kuŝas en la fakto, ke kelkaj grandpastroj de Esperanto ŝajne kredas tiom je si mem kiom je la Internacia Lingvo kaj ne sukcesas doni al la gejunuloj la « fidon ». Realismo estas afero de plenkreskuloj. Oni

unue kredu je Esperanto kaj nur poste elektos aŭ instigos la preferatan aktivadojn. En Gresillon tre ofte la ĉeestantoj elektis periodon pli pro la dato ol pro la programo, kiun ili eĉ kelkfoje ignoras, kio ne ĉiam damaĝas Esperanton.

La raporto de la Ĝenerala Kunveno kaj de la Administra Kunveno kiu sekvis, alportos al vi, espereble, respondojn al la demandoj, kiujn vi estus farintaj se vi ĉeestus. Demandoj eĉ faritaj perletere povas doni impulson aŭ direkton al la vivo en la Domo kaj al la demandoj pli bonan konon de la realo, bona aŭ malbona, kaj eviti la neutilajn « Kial vi ne farus tion... ».

Melankolio ? Realismo ? Eble la ideo, ke iu ŝanĝo necesas sed ankaŭ la neebleco vidi de kie ĝi venos. Samaj homoj pluigas samajn ideojn. Ŝanĝo de homoj devus okazi. Sed tio estas alia afero...

NOS PEINES

Nous apprenons le décès de Mme G. Debande survenu le 19 mars 1983 dans sa 83^e année. Nous présentons à sa famille nos sincères condoléances.

ASSEMBLÉE GÉNÉRALE du Dimanche 1^{er} Mai 1983

L'assemblée générale ordinaire des sociétaires de la Maison Culturelle Espérantiste s'est réunie le Dimanche 1^{er} Mai 1983. Le nombre des présents et représentés était de 279 pour un capital de 77 300 francs.

Le quorum étant atteint, la séance est ouverte à 10 heures. M. F. Boyet est élu président de séance.

Rapport financier

Le compte d'exploitation et le bilan de l'exercice de l'année 1982 sont présentés par le trésorier, Dominique Babin. L'excédent du compte « séjours » a diminué de 10 % par rapport à l'année dernière. Les différents comptes ont varié, en francs constants, de la façon suivante : augmentation de 3 % des inscriptions, diminution de 18 % de la caisse « tickets », de 7 % du compte alimentation, de 3 % des salaires. On enregistre une augmentation de 2 % des charges sociales, une diminution de 3 % des frais de bureau. Si les frais de chauffage et les activités culturelles augmentent, on note une diminution sur les impôts et assurances.

Le trésorier propose de calculer dans les frais « activités culturelles » les séjours offerts aux conférenciers et professeurs. Cela permettrait d'avoir une idée plus réelle du coût de ces activités culturelles.

Le compte librairie-souvenirs est bon puisqu'il fait ressortir un excédent qui représente 20 % de l'excédent de recettes total.

Le chapitre « publicité » intervient toujours pour compenser le déficit de « Kulturaj Kajejoj ».

Le trésorier souligne une forte augmentation des dons qui ont pratiquement doublé par rapport à l'année dernière.

En commentant le bilan dans son aspect « actif », D. Babin indique que le fait que les participants versent 10 % de leurs frais de séjours à l'avance permet de « gommer » un peu le creux de trésorerie dû à l'absence de rentrées entre Septembre et Mars.

Dans le chapitre « Passif », la dette est en voie de règlement définitif. Le fond « photocopieur » augmente assez lentement. M. P. Babin lance un appel pour que ceux qui auraient un photocopieur d'occasion fonctionnant sur papier ordinaire dont ils souhaiteraient se séparer fassent une offre à la M.C.E.

Le compte d'exploitation et le bilan de l'exercice sont approuvés à l'unanimité par l'Assemblée Générale, après quitus des commissaires aux comptes.

Résolutions capital social

L'Assemblée Générale enregistre le remboursement de 11 parts de sociétaires pour un capital de 1 100 francs. Elle enregistre également la souscription de 81 nouvelles parts.

La société ayant perdu 5 membres et s'étant enrichie de 28 nouveaux membres comporte maintenant 545 membres.

Certains sociétaires restent introuvables. Pour essayer de résoudre ce problème, les noms de ces sociétaires pourraient être affichés au château et publiés dans des revues esperantistes.

Résolutions diverses

MM. Cortes, Prévot et Lafargue sont reconduits dans leurs fonctions de commissaires aux comptes.

Rapport d'activité

Pour améliorer l'occupation de la maison, il est proposé d'adapter les dates des séjours au calendrier des rencontres esperantistes. Compte tenu du nombre de ces rencontres, il ne paraît pas possible de modifier utilement le calendrier de la M.C.E.

Certains problèmes administratifs concernant l'accueil des enfants à la M.C.E. sont en voie de règlement.

Le président P. Babin évoque le problème du fond « Belbona Espero ». Ce fond, alimenté par un don anonyme de 50 000 frs est destiné à accueillir de jeunes étrangers en utilisant les intérêts annuels sur cette somme. Malgré un appel fait aux groupes étrangers, aucun candidat ne s'est encore présenté. Il serait peut-être nécessaire d'élargir à d'autres que les jeunes étrangers la possibilité de bénéficier de cette aide.

Le rapport d'activités est adopté à l'unanimité par l'Assemblée Générale.

L'ordre du jour étant épuisé, l'assemblée générale est close à 12 heures 30.

Le secrétaire de séance,
J.-P. GUILLLOT.

CONSEIL D'ADMINISTRATION du Dimanche 1^{er} Mai 1983

Sont présents : MM. et Mmes D. Babin, P. Babin, Bénistant, F. Boyet, H. Boyet, Dairon, Guillot, Mathé, Vincent.

Propositions des sociétaires

Le conseil d'administration étudie les propositions suivantes :

— « Mentionner sur les programmes que les menus servis à Grésillon sont typiquement français ». Cela a été fait sur les programmes 83.

— « Respecter les régimes alimentaires des participants ». Les responsables des stages font ce qu'ils peuvent mais ne peuvent pas prévoir autant de menus que de régimes.

— « Autoriser les campeurs à prendre leurs repas dans leur tente ou leur caravane ». Ce système a déjà été essayé et a provoqué certains incidents entre les campeurs et les participants logeant au château.

— « Améliorer les installations des campeurs ». Cette amélioration se fait progressivement. Grésillon n'est pas un camping.

— « Augmenter les droits d'inscriptions ».

— « Diminuer les tarifs de séjours qui sont trop chers ».

Ces deux propositions contradictoires dans leur esprit montrent la difficulté qu'il y a à satisfaire tout le monde, et semblent s'annuler !

— « Organiser l'Assemblée Générale pendant les vacances pour permettre à un plus grand nombre d'y assister ». Les stages occupant alors le château, cette solution poserait plus de problèmes qu'elle n'en résoudrait.

— « Revoir l'organisation générale des stages qui est trop rigide, ainsi que l'animation qui est trop traditionnelle ». Les bonnes volontés agissantes ne sont en général pas refusées à Grésillon, mais il est difficile de prévoir à l'avance ce que souhaiteront, dans leur ensemble, les participants d'une période donnée.

Etat des inscriptions pour l'été 83

Au 1^{er} Mai 83, le nombre de personnes ins-

crites aux différents stages est le suivant : 1^{er} stage : 66, L.F. Koop : 20, 3^e stage : 48, 4^e stage : 10, stage FUBE : 18.

Organisation des stages d'été

Les programmes des conférences pour le 1^{er} stage sont prêts. Des cours seront assurés par Mme Childs-Mee et Mlle Turbillon.

Les cours du 3^e stage seront assurés par Mme Childs-Mee pour le 1^{er} degré et les enfants, par R. Lloancy pour le 2^e degré et par P. Babin pour le 3^e degré.

Le programme du 4^e stage a déjà été publié dans Kulturaj Kajeroj et comportera les activités manuelles suivantes : photo, patchwork, cartonnage, ceramique. M. F. Boyet assurera des cours orientés vers ces activités.

Questions diverses

— L'Association « Suno kaj maro » souhaite faire un stage à Grésillon du 20 au 23 Avril 1984.

— Mme Chevery prépare des programmes d'excursions dans la région, ainsi que des fiches détaillées sur certaines visites possibles.

Travaux

— Le château est maintenant branché au service des eaux communal.

— Un lave-vaisselle a été acheté.

— Des arbres ont été plantés dans la propriété ; il est prévu d'en planter d'autres l'année prochaine.

— L'installation électrique sera améliorée dans le laboratoire de photo et dans la salle de cours dite « salle de vannerie ». Dans cette dernière salle, un tableau noir sera également installé.

— Une corde - main courante sera installée dans l'escalier qui monte au deuxième étage.

— L'escalier qui monte à l'annexe dite « logement Babin » menace de s'effondrer et sera renforcé.

Le secrétaire de séance,
J.-P. GUILLLOT.

KULTURAJ KAJEROJ

1983

MAJO-JUNIO-JULIO-AŬGUSTO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86000 Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo

A. Frangeul

Iran-Esperanto raportas

A.-R. Mamduhi

Fruktoj de la spaco

Mini-elektroniko kaj poŝ-komputeroj

S. Guillot

La mastro de Kerboja,

Amremano en kamparsocia strukturo

S. Boniol

Fantazio sur erikejo

R. Stirling

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn orelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn kaj kritikojn.